# Esperanto Numismatika Asocio




**Esperanta Numismatiko** 2014 **Jarkolekto 1 - Numero 2**





*La 1a jarkolekto estas omaĝo al Hans Jankowski*

# *E N H A V O T A B E L O*

***de aprilo 2014***


Titola paĝo …………………………………………………………... 1

Enhavotabelo ………………………………………………………… 2

De ni por … ni !………………………………….……………….. 3

Moneroj & medaloj …………………………………………………… 4

*Itala Esperanto-Kongreso 1976*

*Unua Danubvala Konferenco 1948*

*UEA - kongreso 1923*

Terminaro …………………………………………………………….. 8

Retpoŝto …………………………………………………………… 13

Anoncoj & Eventoj …………………………………………………… 19

# *De ni por … ni !*

Jen la dua numero de "Esperanta Numismatiko" kun pli da rubrikoj, pli da tekstoj, pli da kontribuoj…

Nia asocio sufiĉe rapide kreskadas. Ni jam havas 25 membrojn el 9 diversaj landoj kaj 3 diversaj kontinentoj.

Jen listo de la unuopaj membroj:

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Belgio | 10 |
| 2 | Ĉeĥio | 1 |
| 3 | Germanio | 7 |
| 4 | Hispanio | 1 |
| 5 | Finnlando | 1 |
| 6 | Francio | 1 |
| 7 | Nepalo | 2 |
| 8 | Nov-Zelando | 1 |
| 9 | Pollando | 1 |

Listo de muzeoj kaj bibliotekoj:

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Aŭstrio | 1 |
| 2 | Belgio | 1 |
| 3 | Britio | 1 |
| 4 | Germanio | 2 |
| 5 | Ĉeĥio | 1 |
| 6 | Hispanio | 3 |
| 7 | Japanio | 1 |
| 8 | Kroatio | 1 |
| 9 | Nederlando | 1 |
| 10 | Uzbekio | 1 |

Estas prezentataj ĉi-foje tri medaloj kun (urba) pejzaĵo sur la reverso, tri medaloj faritaj per tri diversaj metaloj aŭ alojoj. Tri novaj rubrikoj, respektive pri la numismatika terminaro, pri viaj mesaĝoj kaj reagoj kaj pri diversaj eventoj kaj anoncoj. Eĉ interŝanĝo de solvoproponoj pri la enigmoj de eble la pli malnova aŭ eĉ unua esperanta medalo. Krome la unua alfabeta seriero de numismatikaj terminoj, por kiuj serĉado en PIV estis foje fruktodona.

Bedaŭrinde ĝis mi ne ricevis kontribuaĵon por la rubriko en kiu oni povas kaj rajtas prezenti ekzemplerojn el la propra kolekto. Tamen mi ne povas imagi ke ne ekzistus numismatikaj trezoreroj en la ŝrankoj de niaj numismatoj. Metu ilin en la lumon!

Rekomendinda por numismatoj sendube estas  la 2014a numismatika ekpozicio en Herzberg am Harz (Germanio).

Por la jaro 2015 mi provizore jam nun volas inviti niajn membrojn al la unua kunveno de ENA dum la jubilea Universala Kongreso en Lille (Francio). Probable ni krome havos propran standon dum unu tago!

Finfine denove peto al ĉiuj legantoj de EN: bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn, rimarkojn, ideojn, reagojn,  bildojn kaj tekstojn pri viaj propraj kolektaĵoj esperantaj!

Bert

**M O N E R O J & M E D A L O J**

## Tipo A 1

Itala Esperanto-Kongreso 1976







Lando: Italio

Metalo: bronzo

Diametro: 32 mm

Kvanto: nekonata

Pezo: 18,70 gr

Diko: 2 mm

### *Averso:*

Busto de Zamenhof. Skribo: “DOTT. L. L. ZAMENHOF” Skribo sube: Riccardo Rossi

### *Reverso:*

Esperanto-steleto super bildo de kastelo de la urbo Massa kaj la urba blazono. Ĉirkaŭa skribo: “74a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO MASSA 18-24 SEPTEMBRO 1976”

### *Rimarko:*

La hoketo apartenas al la medalo, la ĉenero ne.

## Tipo A 1

Unua Danubvala Konferenco 1948






| | |
|---|---|
| Lando: Hungario | Kvanto: nekonata |
| Metalo: aluminio | Pezo: 6 gr |
| Diametro: 40 mm | Diko: 2,50 mm |

### *Averso:*

Granda stelo kun “E” en la centro. Ĉirkaŭa skribo: 1948. I-A DANUBVALA ESPERANTO KONFERENCO.

### *Reverso:*

La Fiŝista Bastiono (Helászbástya) en la urbocentro de Budapeŝto. Sube: rubando kun skribo: “BUDAPESTI EMLE K” (Memoraĵo pri Budapeŝto)

### *Rimarko 1:*

Vidu ankaŭ: Vikipedio: Budapeŝto → Esperanto en Budapeŝto

### *Rimarko 2:*

Tiu -ĉi “unua” Danubvala Konferenco restas ĝis hodiaŭ la “nura”

## Tipo A 1

# UEA – kongreso 1923











Lando: Germanio

Metalo: arĝentumita latuno

Diametro: 31 mm

Kvanto: nekonata

Pezo: 11 gr

Diko: 2 mm

### *Averso:*

Busto de Zamenhof en la mezo. Suba skribo: “D ro L.ZAMENHOF”
Ĉirkaŭa skribo: “XVa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO NÜRNBERG 2-8 AUG 23”.

### *Reverso:*

Kastelo kaj domoj de la malnova Nurembergo. Suba skribo: “PAWLIK kaj HEINR.ANIM”.

### *Rimarko 1:*

La medaleto estis farita okaze de la 15a Universala Kongreso en la jaro 1923 en Nurembergo.

### *Rimarko 2:*

La supera ekzemplero klare montras ke la medalo origine estis arĝentumita. Tamen jam rimarkeblas makuletoj kaj spuroj de eluziĝo.
La alia ekzemplero preskaŭ komplete perdis la arĝentan tavolon. Restas nur kelkaj tre etaj spuroj de arĝentumo.

### *Rimarko 3:*

**Serĉataj**: informoj pri la nomoj “PAWLIK kaj HEINR.ANIM” kaj bonkvalita kopio de ankoraŭ “nova” ekzemplero de ĉi-medalo.

# *T E R M I N A R O*

averso

ĉirkaŭa skribo

portreto aŭ busto




perlorando

monerfiguro

reverso

valorindiko




monofarejestra signo
(J.W.A. van Hengel)
Utrecht)

monersigno
(monofarejo

jarindiko

## *Klarigoj pri la antaŭa paĝo*

**monerfiguro / medalfiguro**: *la kompleta bildo de averso aŭ reverso. Kutime ĝi konsistas el diversaj elementoj, kiel la centra bildo, la valorindiko, la ĉirkaŭa skribo, la jarindiko kaj la kromsignoj. Kiel centra bildo oni ofte preferas portreton, blazonon aŭ alegorian bildon.*

**valorindiko**: *preskaŭ ĉiuj modernaj moneroj havas valorindikon. Tio nur eblas se la valoro restas longtempe konstanta. En la pasinteco la valoro dependis de la metalprezoj kaj ĝi tial daŭre ŝanĝis.Do, valorindiko mankis.*

**kromsigno**: *kutime temas pri la signo de la monofarejo kaj / aŭ la signo de la monfarejestro. Aliaj kromsignoj indikas i.a. la inicialojn de la desegnisto kaj / aŭ de la gravuristo.*

**jarindiko**: *preskaŭ ĉiuj modernaj moneroj / medaloj havas jarindikon. Pasintece oni ofte indikis la regadperiodon de potentatoj. Poste religiaj elementoj aŭ la fondo de dinastio estis indikitaj. Ekde 1370 la unuaj ciferoj ekaperis; ili estis romiaj. La unuaj "arabaj" ciferoj aperis en Eŭropo en 1424.*

**ĉirkaŭa skribo**: *teksto sur la monerfiguro laŭlonge de la rando.*

**flanka skribo**: *teksto sur la rando de la monero / medalo*

**rando**: *la flanko de monero aŭ medalo. Prilaboritan randon oni nomas noĉrandon, kablorandon, florrandon ktp.*

Por la klarigo de aliaj terminoj, vidu la alfabetan liston en ĉi-numero kaj en la venontaj numeroj de la revuo.

## *Alfabeta listo(1):*

**averso**: *tiu flanko de plata objekto kiu estas normale elmetata al la vido*

**arĝentumi**: *meti arĝentan tavolon sur monero aŭ medalo*

**bismuto**: *metalo flavblanka kaj rompiĝema*

**bronzo**: *alojo de kupro kaj stano (en proporcio ĉ 8/1), al kiu oni ofte aldonas en ioma kvanto zinkon aŭ plumbon*

**busto**: *supera parto de la homa korpo, kun la kapo kaj la brusto. Sur moneroj kaj medaloj bildoj de ege famaj personoj*

**ĉirkaŭa skribo**: vidu sur la antaŭa paĝo

**diametro**: *longo(ŝnuro) tra la simetricentro*

**diko**: *dimensio alia ol longo kaj larĝo*

**eldonokvanto**: *kvanto de samaj eldonitaj moneroj aŭ medaloj*

**fandi** : *likvigi per varmo solidan substancon por fari medalojn*

**gravuristo**: *artisto kiu profesie gravures artefaktojn*

**helpa mono**: *ne-oficiala pagilo uzata kiam oficiala mono maloftas aŭ mankas*

**jarocifero(j)**: *la datoj aŭ jarindikoj inter du eventoj. Ekzemple la jaro de naskiĝo kaj la jaro de morto de Zamenhof*

**kuproniklo**: *alojo de kupro kaj niklo*

**latuno**: *ĉiaspeca alojo el kupro kaj zinko, flavkolora*

**medalo**: *metala disketo, surhavanta ambaŭ-flanke bildon, signojn aŭ surskribojn, stampita aŭ fandita kiel memoraĵo pri grava okazintaĵo aŭ kiel honoraĵo al merita homo*

**medalisto**: p*ersono kiu profesie faras medalojn*

**mezuro(j)**: *longo, diko ktp*

**monero**: *ĉiu aparta peco de metalmono*

**mono**: *pagilo aŭ difinita kvanto da tiu pagilo, uzata kiel interŝanĝilo en aĉeto kaj vendo*

**monofarejo**: *laborejo en kiu oni faras / fabrikas monerojn aŭ medalojn*

**muromedalo**: *kutime sufice granda medalo por pendigi kontraŭ  muro*

**monosistemo**: *jura statuto, difinanta la valoron de la monunuo rilate al oro aŭ al fremdlanda mono, la reĝimon de la emisio kaj la kondiĉojn de konvertebleco*

**numismatiko**: *scienco pri antikvaj moneroj kaj medaloj (laŭ PIV)*

**orumi**: *meti oran tavolon sur monero aŭ medalo*

**pezo**: *mezuro de forto, rezultanta de la tera altiro, per kiu la korpoj pezas.Ĝi rilatas al konvencia unuo*

**skribo**: *teksto sur monero aŭ medalo*

**signo / simbolo**: *io, kio prezentas, elvokas aŭ servas por esprimi ion alian, pro analogeco aŭ pro konvencio, precipe io konkreta, kiu anstataŭas ion abstraktan*

**signo de la monofarejestro***:* *persona simbolo de la estro de monofarejo*

**signo de la monofarejo**: *simbolo de la monofarejo*

**valorindiko**: *vidu la antaŭan paĝon*

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

## 1. Konversacioj



Vidu numeron 1 de januaro, paĝon 8!

13.10.2013 9:18

Estimata sinjoro Purdy,

Kun ĝojo mi bonvenigas vin kiel nova ano de UEA-faka asocio ENA.

Homo kun via sperto estos valora membro en nia studgrupo. Fakte, ni ne estu nur kolektantoj de medaloj, moneroj ktp, sed homoj kiuj volas studi la objektojn el numismatika, historia kaj aliaj interesaj vidpunktoj.

Dankon ankaŭ pro viaj ege interesaj informoj pri ĝenerala numismatiko en Nov-zelando kaj pro la diskonigo de mia alvoko.

Ĉu en via lando jam aperis esperantaj medaloj aŭ aliaj interesaj numismatikaĵoj? Ĉu vi eble povus/ volus kontribui al la unua numero de nia organo, kiu aperos en januaro 2014?

Sincere kaj samideane,

Bert Boon/ Belgio

17.01.2014 20:41.

Kara s-ro Boon,

Dankon por la unua numero de la ENA-revuo. Pri FRIQUE ATLANTIQUE (pgx. 9) - ĉu FRIQUE ne estas AFRIQUE ("Afriko" en la franca)? Estas tamen enigmo, kial oni uzus francajn formojn de tiuj geografiaj nomoj!

PS: ... sed ankaŭ la dato estas franclingva (JUIN 1908). Jen ekzemplero vendita rete, sed la priskribo apenaŭ pli klarigas la aferon:

Sincere,

Martin Purdy

18.01.2014 16:44

Kara s-ro Purdy,

Dankon pro viaj pozitiva reago kaj preteco helpi min solvi la enigmon. La medalon kiun vi montras ĉe Delcampe estas tiu el la ENA-gazeto. Jes, mi hazarde aĉetis ĝin!

La franca vorto "frique" havas propran signifon= "mono" en la neskriba lingvouzo. Provizore la enigmo do restas!

Danke kaj samideane,

Bert

18.01.2014 18:31

Ĉu ne 'fric' kiam temas pri mono? Estus strange, uzi tian esprimon sur medalo, precipe antaŭ 100 jaroj, ĉu ne? Pro la proksimeco de la vorto Atlantique mi estas preskaŭ centprocente certa, ke la komenca litero de Afrique aŭ mankas au estas parte kovrita de alia bildelemento. Ĉu vi pretus sendi al mi pli grandan foton por ekzameno?

Sincere

Martin

1.01.2014 19:32

Vi tute pravas pri la ortografio de "fric". Mi kontrolu antaŭe por eviti tiajn erarojn! Dankon!

Mi sendas al vi la pligrandigitan flankon aldone.

Mi denove pristudis la vorton per diversaj lupeoj, sed ne konstatis ke la litero A estus kovrita de alia bildelemento.

Por la gravuristo estis sufiĉe da raŭmo por la tuta vorto AFRIQUE. Do kial li forlasu la unuan literon?
En la kazo de malbona observo aŭ takso de la disponebla raŭmo, oni nur poste konstatos la propran eraron kaj ne plu kapablus forviŝi aŭ nuligi la unuan literon. Tamen ankoraŭ eblus nuligi la lastan literon, sed kiel vi mem povas konstati, tio tute ne estis necesa, ĉu ne, do tion li ne faris?
Ĉiel, mi ankoraŭ ne komprenas la signifon de FRIQUE...

Amike,

Bert

18.01.2014 21:25

Dankon por la pligrandigita bildo. Jen nova teorio: ni imagu, ke la medalo respeguligas la terglobon; la sinjoro kun la hispaneca ĉapelo estu sudamerikano, do inter li kaj la duonnuda afrikanino estas la Atlantika Oceano, kaj jen la vorto ATLANTIQUE. Aliflanke de la Atlantiko estas Afriko ...

Ĉu estas eĉ sign(et)oj de literoj aliloke sur tiu flanko de la medalo, proksime al la aliaj homoj, ekz-e "Europe" aŭ similaj? La literoj estas tre malfortaj kaj rapide malaperus post nur malmulta frotado, bedaŭrinde. Ĉu vi povas legi ion el la "vorto" ĉe la rando de la medalo je la "4-a horo", malantaŭ la homoj, kie ni atendus ekz-e la Hindan Oceanon au Aŭstralion? Estas "io" tie, sed ĝi estas por mi nelegebla, eĉ je 500%-a pligrandigo.

Sincere,

Martin

21.01.2014 20:31

Interesan teorion vi prezentas pri ebla malapero de gravuritaj literoj.

Bedaŭrinde mi tute ne havas la impreson ke la gravuritaj literoj estus facile forfroteblaj, male. La problemo estas ke la tekniko de fundado ne chiam estas sukcesa koncerne la reprodukton de detaloj. Tial ech povas malaperi literoj aŭ vortoj kiel F. MAGDELAINE EDIT (nur la supera triono de la literoj estas per lupeo videbla je la "sesa horo"! Mi rekonstruis ilin dank'al la broshuro de Jankowski!). Je la "4a horo" estas iu reprodukto de "manskribo", ne legebla, sed apertenanta al la origina medalo.

Same interesa laŭ mi estas la jarciferoj 1908 sur medalo de 1912 (laŭ Hans Jankowski)! Mi ne povas imagi ke la gravuristo celis ŝerci. Aù ĉu la vortoj FRIQUE ATLANTIQUE ankaŭ estus ŝerco?! Tro fantasia klarigo, mi pensas.

Amike,

Bert

## 2. Reagoj

17.01.2014 13:48

Kara Bert,

bonvenon en la mondo de Esperanto-gazetaro!
Kiel biblioteko ni kompreneble tre shatas, se vi regule alsendos la novajn numerojn. Kompreneble ni preferas kolekti presitajn, surpaperajn eldonojn, sed shulde al la tempo moderna, ankau kolektas la elektronikajn.

Persone al mi tre plachas via ideo, ne postuli kotizojn de la membroj, do ankau ne instali estraron kaj superfluan buorkratecon.

Fartu bone, vivu kaj prosperu la nova gazeto!

Utho Maier, Germana Esperanto-Biblioteko Aalen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.01. 2014 15:04

Saluton Bert,

Tutkoran dankon pro la bela revuo.

Amike,

Henri Schutters (Belgio)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

18.01.2014 13:11

Tre kara Boon-Tudts,

Mi elkore dankas vin pro via informo tio kio ege placas al mi. La fotoj kaj informoj estas tre memorindaj. Mi gratulas vin pro via laboro.

Plej amike,

Mukunda Pathik el Nepalo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

21.01.2014 13:53

Dankon kaj gratulon
amike

Michel Muszynski (Francio)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.01.2014 23:09

Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstrato 6
DE-37412 Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo, Germanio

Kara sinjoro Boon,

elkoran dankon pro via grava informo.

Mi tre interesighas pri la gazeto REVUO ENA Jarkolekto 1 Numero 1.

Amike salutas

Peter Zilvar

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.02.2014 16:16

Mi profitas de via reago, por gratuli vin pro la revuo: tre bona komenco, treege interesa la priskribo de la medaloj - mi kredas, ke s.ro Jankowski estos tre ĝoja pro via iniciato. Mi varme esperas, trovi iom da tempo kaj precipe ion interesan por kontribui al la revua enhavo.

Plej karajn salutojn sendas

Elda Dörfler (Germanio)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.03.2014 10:25

Saluton Bert,

Mi rememoras vian demandon pri mia aliĝo, kaj efektive mi ŝatus ke vi aligu ankaŭ min al la Esperanto Numismatika Asocio.

Grandan sukceson mi deziras al vi!

Amikajn salutojn

Ivo Schenkel (Belgio)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

March 17, 2014 12:11 PM

## 9-a Movada Foiro dum la UK en Bonaero

La Movada Foiro estas grava okazo dum la Universala Kongreso, kiam ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj movadaj instancoj havos eblecon senpage prezenti sian agadon al la kongresanaro. Ĉiu asocio ricevos spacon ĉe tablo, kie ĝi rajtos prezenti siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile.

**Dato** de la Movada Foiro en Bonaero: sabaton, la 26-an de julio 2014.

**Ejo:** en salono Gran Panamericano, ĉe la kongresejo en hotelo Panamericano.

**Komencohoro:**19h00. Ekspoziciantoj rajtas veni je 18h30 por aranĝi siajn tablojn.

Anna Lowenstein (Italio)

2014-03-18 20:44

Estimata sinjorino Lowenstein,

Mi dankas vin pro via invito partopreni en la Movada Foiro dum la UK.

Bedaùrinde mi chi-jare nek povas cheesti nek povas peti alian membron reprezenti la novan asocion.
Tamen, dum la venonta UK en Lille, ENA certe akceptos la inviton kaj almenaù mi planas cheesti. Aliajn membrojn mi volas instigi.

Mi deziras fruktodonan agadon kaj sukceson en Bonaero!

Altestime kaj samideane,

Bert Boon

Iniciatinto de ENA (Belgio)

dinsdag 18 maart 2014 21:34

Kara Bert,

Mi bedaŭras, ke ENA ne povos aperi ĉe la Movada Foiro ĉi-jare. Sed certe estos loko por vi venontan jaron!

Kore,

Anna

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

**A N O N C O J**

**&**

**E V E N T O J**

**Interkultura Centro Herzberg** (http://ic-herzberg.de) prizorgas la Esperanto-agadon en la urbo: estas kursejo, klerigejo,
loka, regiona kaj internacia movada centro,
ofertas lernejan kaj eksterlernejan instruadon de Esperanto,
helpas al vizitantoj,
funkciigas bibliotekon kaj gazetarkivon,
organizas kunsidojn, seminariojn, konferencojn, kongresojn,
donas ĉiutipan helpon rilate al Esperanto.

La **1an de junio 2014** okazos: malfermo de **ekspozicio pri medaloj** en la Esperanto-ĉambro de la Welf-kastela muzeo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## 9-a Movada Foiro dum la UK en Bonaero

La Movada Foiro estas grava okazo dum la Universala Kongreso, kiam ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj aliaj movadaj instancoj havos eblecon senpage prezenti sian agadon al la kongresanaro. Ĉiu asocio ricevos spacon ĉe tablo, kie ĝi rajtos prezenti siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile.

**Dato** de la Movada Foiro en Bonaero: sabato, **la 26-a de julio 2014**.

**Ejo:** en salono Gran Panamericano, ĉe la kongresejo en hotelo Panamericano.

**Komencohoro:**19h00. Ekspoziciantoj rajtas veni je 18h30 por aranĝi siajn tablojn.

Anna Lowenstein (Italio)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

## Ekspozicio "Esperanto kaj kolektado" demandas pri viaj kolektoj

**La 27-an de septembro en 2014** (kadre de la tutŝtata filetala ekspozicio) okazos ankaŭ inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio kun la supra temo en la Esperanto-Muzeo Svitavy en Ĉehio. Por ke ĝi estu laŭeble plej kvalita kaj bunta, organizantoj bonvenigus kunlaboron de

Esperanto-kolektantoj!

Ni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona pritrakto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgita. Nomoj (kaj laŭ interkonsento fotoportretoj) de la ekspoziciantoj estos videble menciitaj. ĈEA pretas repagi sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post fino de la ekspozicio.

Ni serĉas ekspoziciaĵojn en la sekvaj kategorioj:

1.) **"Esperantaĵoj"** (prioritate filatelaĵoj: poŝtmarkoj kaj kovertoj, kaj tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj) sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne tiom bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).

2.) **"Kion kolektas esperantistoj"** - specimenoj el diverstemaj kolektaĵoj pri NEesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkloraj pupoj, ludiloj ĝenerale k.t.p.

3.) **"Kuriozaj suveniroj el eksterlando"**

Bv. sendi vian ĝeneralan oferton al la adreso muzeagrupo@esperanto.cz (kun priskribo kaj laŭeble fotaĵoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bv. sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de sendokostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum Regiona renkontiĝo en Litomyšl). Dankon por via komprenemo, ni antaŭdankas vian intereson, kaj antaŭĝojas pri la kunlaboro!

laŭ Retkomunikoj de ĈEA, 2014/01

Dankon al Elda Dörfler

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

# Esperanto-kolektaĵoj kaj specialaj ekspozicioj rilate al Esperanto kaj kolektaĵoj

Kara Elda,
karaj Esperanto-kolektantoj,
karaj E-kolektantoj en Ĉeĥio,

ni tre ĝhojas, ke vi aktivas.

Ĉe nia Germana Centro troviĝas multaj diverstipaj E-kolektaĵoj kaj E-arkivmaterialoj.
Estas la situacio, ke ni kvazaŭ vivas inter la Esperanto-kulturvaloraĵoj.
Multaj tiaj materialoj estas ordigitaj, aliaj ankoraŭ ne.
Tamen ni organizas regule specialajn ekspoziciojn sur la Esperanto-platformo de

la kastelo Herzberg. La jam 8a eskpozicio temas pri la aktivecoj de Joachim Gießner (longjara  IFEF-prezidinto).

Je la unua de junio 2014 ni solene inaŭguros novan eskpozicion kun la temo "Esperanto kaj medaloj".
Ĉu vi havas medalojn?
Ĉu ni eble povos ŝanĝi ilin?

En oktobro ni okupiĝos pri Esperanto kaj filatelo (filatelaj belkovertoj, ktp.).
Volonte vi povos viziti nin, ĉar ni havos riĉan E-jarprogramon.
Bonvenon en Herzberg - en via Esperanto-urbo.

Amike salutas
por la ICH-estraro
Petro Zilvar kaj Zsofia Korody